

Vizitindaj lokoj en reĝa urbo Krakovo kaj ĉirkaŭaĵo.

Priskribo: www.esperanto.zanet.pl/krakovo/ www.esperanto.zanet.pl/krakovo/vidinda/gvidlibro.html

Reĝa Vojo: <https://goo.gl/maps/LcYkzPKpZFG2> – inter Barbakano (kaserolo-forma konstruaĵo, kie soldatoj kontroladis ĉiujn alvenintojn), tra Pordego de Floriano “Brama Floriańska” (en unu el 16 iamaj turoj, kiuj staris ene de muroj iam ĉirkaŭataj Malnovan Urbon), laŭ strato Floriańska (t.e. de sankta Floriano), tra Ĉefplaco (plej granda mezepoka placo en Eŭropo) - apud preĝejo de sankta Maria (http://www.krakow4u.pl/panoramy/060_kosciol-Mariacki-prezbiterium/kosciol-mariacki-prezbiterium.html http://www.krakow4u.pl/panoramy/059_kosciol-Mariacki-nawa-glowna/kosciol-Mariacki-nawa-glowna.html) kaj preter Drapaloj (mezepoka vestvendejo t.n. “Sukiennice”, sukno = materialo por roboj, vestaĵoj ktp), laŭ strato Grodzka (gród = malnova urbo kun muroj) ĝis Reĝa kastelo sur monteto Vavelo (“Wawel”) apud rivero Vistula (“Wisła”). Reĝoj ĉiam veturadis tra la urbo laŭ la vojo kaj pro tio ĝi portas nomon “reĝa”.

En pasinteco grandaj muroj ĉirkaŭigis Malnovan Urbon sed antaŭ du cent jaroj ilin anstataŭigis plantoj kaj arboj (nuntempe troviĝas tie zono de verdeco kun promenojetoj, tiel nomata “Planty”).

Proksime al Pordego de Florian kaj Barbakano troviĝas bela teatrdomo (kremkolora konstruaĵo kun verda tegmento) kaj malnova ruĝbrika kaj ruĝtegmenta preĝejo de Sankta Kruco (kun nur unu kolono kaj interesaj surmuraj bildoj interne: http://www.krakow4u.pl/panoramy/063_kosciol-Sw-Krzyza-nawa/kosciol-Sw-Krzyza-nawa.html), apud kiu situas plej malnova nesakra konstruaĵo en la urbo.

Absolute plej malnova konstruaĵo estas blanka preĝejo de sankta Adalberto sur Ĉefplaco. En Malnova Urbo, kiu same kiel Reĝa kastelo apartenas al mondakulturheredaĵo de UNESCO, vizitindas ankaŭ mezepoka Jagellona Universitato (Collegium Maius, Collegium Novum ktp).

Panoramo de la urbo bone videblas de:

A. Turo de preĝejo de sankta Maria apud Ĉefplaco:

https://pl.wikipedia.org/wiki/Plik:Kosciol_mariacki_krakow.jpg

Je ĉiu ronda horo vi povas vidi kaj aŭskulti trumpetiston ludantan en kvar fenestroj de la pli alta turo kiel rememoro de averto kontraŭ malamikoj atakintaj la urbon.

B. Turo de Malnova Urbodomo sur Ĉefplaco:

http://www.krakow4u.pl/inne/ratusz/html_foto/ratusz_035.html

C. el ŝutmontetoj dediĉitaj al naciaj herooj: http://www.krakow4u.pl/krakow_kopce.html

C1. Ŝutmonteto de Generalo Kościuszko (okcidente de urbocentro), ĉe fortikaĵo ĉirkaŭita de arbaro):

C2. Ŝutmonteto de Marŝalo Piłsudski (sudokcidente de urbocentro), proksime al zoo- ĝardeno, eblas rigardi aviadilojn surteriĝantajn en flughaveno Kraków-Balice

C3. Ŝutmonteto pri kiu oni diras, ke ĝi estas tombejo de legenda princoreĝo Krakus (troviĝas sude de urbocentro):

C4. Ŝutmonteto de Wanda - filino de la reĝo (oriente de urbocentro)

Kio estas vizitinda sur Ĉefplaco:

D1. Ligna mezepoka altaro skulptita de germana artisto Veit Stoss en preĝejo de Sankta Maria. La reĝa preĝejo estas bela interne - rigardu al plafonon! Starante ekstere provu trovi sunhorloĝon sur muro de la preĝejo (dekstra flanko).

https://en.wikipedia.org/wiki/Veit_Stoss_altarpiece_in_Krak%C3%B3w#mediaviewer/File:Altar_of_Veit_Stoss,_St._Mary%27s_Church,_Krakow,_Poland.jpg

D2. Malgranda blanka preĝejeto de sankta Adalberto - plej malnova konstruaĵo en Krakovo, kiu devenas el 11a jarcento

https://upload.wikimedia.org/wikipedia/commons/1/19/20120710_Krakow_Kosciol_sw_Wojciecha_59_45.jpg

D3. Draphaloj - mezepoka vestvendejo (t.n. „Sukiennice”, sukno – vestaĵo, robo) Dum jarcentoj alvenadis tien komerciistoj de diversaj landoj kaj maroj por vendi siajn varojn - ekzemple vestaĵon, sukcon kaj juvelaron.

http://krakow4u.pl/krakow_sukiennice.html

D3.1. Subteraĵoj de Ĉefplaco (enirejo ĉe angulo de Sukiennice, proksime al preĝejo de s. Maria): Antaŭ kelkaj jaroj arkeologistoj trovis interesajn subteraĵojn, kiujn nun ĉiu povas viziti ilin.

<http://www.podziemiarynku.com/index.php?dzial=oszlaku>

D3.2 Galerio de Pola Arto (inter alie bildoj de la plej eminenta, pola kvankam ĉehdevenanta, pentristo Jan Matejko) kiu situas ĉe unua etaĝo de Sukiennice; vi povas ankaŭ viziti kafejeton tie):

<http://mnk.pl/oddzial/galeria-sztuki-polskiej>

D4. Kapoj sur Ĉefplaco (se vi trovos ĉi-tiujn vi versxajne ekvidos ankaŭ aliajn):

D4.1 Ĉe pordo al preĝejo de Sankta Maria

https://www.123rf.com/photo_19410543_carved-head-from-a-door-st-mary-s-church-in-krakow-poland-made-in-1929-by-charles-hukan-cracow-s-his.html

D4.2 Ĉe rando de tegmento de VestVendejo “Sukiennice”:

http://www.krakow4u.pl/eng_index.php?parametr=detale/maszkarony/eng_maszkarony

D4.3 Ĉe arkadoj de la VestVendejo (dekoracio sur kolumnoj):

http://img2.national-geographic.pl/uploads/photo/803/803804/sukiennice-g_owica_kolumny2- fot-Natalia_Rybka-large.jpg

https://annakrzem.files.wordpress.com/2012/09/dsc_0906czb.jpg

<http://2.bp.blogspot.com/->

[VzqPYpLd4Os/TePzuBmawTI/AAAAAAAAABe8/wAc4wVLwEyK/s1600/kapitel+2.jpg2](http://2.bp.blogspot.com/-VzqPYpLd4Os/TePzuBmawTI/AAAAAAAAABe8/wAc4wVLwEyK/s1600/kapitel+2.jpg2)

[https://upload.wikimedia.org/wikipedia/commons/e/e0/Sukiennice \(Cloth Hall\), capital\(1\), 1875-79 designed by Jan Matejko, 3 Main Market Square, Old Town, Krakow, Poland.jpg](https://upload.wikimedia.org/wikipedia/commons/e/e0/Sukiennice_(Cloth_Hall),_capital(1),_1875-79_designed_by_Jan_Matejko,_3_Main_Market_Square,_Old_Town,_Krakow,_Poland.jpg)

D4.4 Kuŝanto sur tero apud Turo de Malnova Urbodomo

<http://static.panoramio.com/photos/large/58115830.jpg>

Aliaj vizitindaj lokoj:

D5 Reĝa kastelo (burgo) sur monteto Wawel (nepre vizitu!) kie vi povas “senti historion” kaj ĝui ekspoziciojn de arto <https://www.wawel.krakow.pl/pl/>

D6 Jagellona Universitato, unu el la plej malnovaj en Eŭropo, precipe Collegium Maius, kie studies inter alie Nikolao Koperniko, papo Johano Paŭlo la Dua kaj aliaj eminentaj personoj. Oni festis jubileon de 650 jaraĝo de la univeritato antaŭ nelonge.

Ĉiutage je 9:00, 11:00, 13:00, 15:00 kaj 17:00 horo en la korto de Collegium Maius ĉe horloĝo malfermas pordetoj kaj ekiras procesio de historiaj figuroj akompananta de instrumenta muziko de korteganoj.

D7 Centro “Europeum” kun ekspozicioj de diverslanda arto <http://mnk.pl/branch/europeum>

D8 Nacia Muzeo kie eblas rigardi inter alie faman bildon “Damo kun ermeno” pentritan de Leondardo da Vinci <http://mnk.pl/wystawy/leonardo-da-vinci-dama-z-gronostajem>

D9 Muzeo de Princoj Czartoryski, inter alie Arsenal, kie oni prezentas artaĵojn de antikvaj tempoj

<http://mnk.pl/oddzial/muzeum-ksiazat-czartoryskich>

D11 Sinagogoj en juda kvartalo Kazimierz kaj nokte bele lumigita ponto “Kładka ojca Bernatka” kun balancigantaj skulptoj de sportistoj super rivero Wisła;

D11 Mezepoka Salominejo en Wieliczka (nepre vizitu!) nur ĉirkaŭ 10km el urbocentro de Krakovo

<https://www.kopalnia.pl/>

D12 Benedikta monakejo en Tyniec kien vi povas veni per boato el Reĝa kastelo de Krakovo

<http://statekkrakow.com/oferta/offer-english.html>

<http://rejsykrakow.com/#>

<http://www.statek-krakow.pl/>

D13 Vizitindas ankaŭ proksimaj natuparkoj:

D13.1 Subkrakovaj Valoj (rokoj, herbejoj, lagetoj etc) nordokcidente de la urbo

<http://dolinabedkowska.pl/> <http://www.naszaryba.pl/>

D13.2 Nacia Parko de Ojców (norde de Kraków)

<https://www.flickr.com/photos/polandmfa/6326553920/>

D13.3 Nacia Parko de Montaro Pieniny (sudoriente de Kraków)

https://pl.wikipedia.org/wiki/Pieni%C5%84ski_Park_Narodowy#/media/File:Trzy_Korony_i_Facimiech_a_2.jpg

D13.4 Nacia Parko de Montaro Tatry (sude de Kraków, ĉe pola-slovaka landlimo)

<https://eo.wikipedia.org/wiki/Tatroj>

Alvenbleco per buso (dum 2 horoj el Krakow al Zakopane) <http://www.mda.malopolska.pl/en>

En Tatroj mi rekomendas antaŭ ĉio:

- 1) veturadon per gondolo <http://www.pkl.pl> el montara kvartalo Kuźnice de la urbeto Zakopane al la pinto Kasprowy Wierch (1987 m) en la montaro aŭ
- 2) veturadon per buseto el stacidomo de Zakopane al Łysa Polana kaj poste promendadon inter montoj kaj tra arbaro al la bela lago Morskie Oko (Mara Okulo): <http://i.wp.pl/a/f/jpeg/31692/morskie-okko.jpeg> kiu troviĝas ĉe piedo de plej alta montopinto de Pollando (Rysy 2449m),
- 3) viziton al belaj valoj Kościeliska aŭ Chochołowska aŭ Strążyńska kaj
- 4) esploradon de la montara urbeto Zakopane <http://www.zakopane.pl/> (domoj de tipe montarana ligna arkitekturo, lignaj restoracioj kun bongusta loka montara manĝo kaj popolmuziko vespere, krome bela arto de montaranoj, geotermaj basenoj proksime ekzemple <http://www.termabialka.pl/En> (Białka Tatrzańska, Bukowina Tatrzańska, Szaflary, Chochołów).

Ĉiuj supre menciitaj lokoj estas fonto de pozitiva energio kaj oni povas bone ripozi tie. Kelkaj el ili UNESCO rekonas kiel mondheredaĵo. Krom la menciitaj lokoj, vi povus viziti ankaŭ :

D14 iaman nazi-germanan mortigkampon “Auschwitz” ĉirkaŭ 70km de Krakovo. Tio estas grava, historia sed tristega loko ĉar oni mortigis multajn homojn tie de diversaj naciecoj. Pro tio verdire mi ne rekomendas veturi tien dum via unua vizito al tiu-ĉi regiono. Nur se vi havas multajn tagojn por viziti ankoraŭ aliajn lokojn. Aŭ eble vizitu ĝin venontfoje. Vi povus viziti ankaŭ

D15 Fabrikon de Schindler en Krakovo, kie germana komerciisto Schindler dum la dua mondmilito sukcese savis vivojn de multaj judoj ofertante al ili laboron tie kaj tiumaniere protektante ilin kontraŭ deviga transporto al la mortigkampon. Tiun historian prezentas fama filmo “La listo de Schindler”. Ankaŭ kelkaj poloj helpis al judoj dum la terura tempo de milito kvankam minacis la mortpuno pro tia agado.

La loko, kie nazistoj konstruis la mortigkampon, en pasinteco apartenis al Dukejo de Oświęcim (Oswietim) kaj ĝis nun troviĝas tie malgranda historia kastelo. Vizitindas ankaŭ troviĝanta proksime naturrezervejo, unika en Eŭropo, ĉe malnovaj 600-jaraĝaj lagetoj, kie oni kultivas fiŝojn kaj kien ĉiu jare venas multaj eksterordinaraj migrantaj birdoj. Jen interesa filmo pri naturaj valoroj de la fiŝlagetoj ĉe Spytkowice, Zator kaj Oświęcim: http://www.citdk.zator.pl/pl/54776/0/Film_Dolina_Karpia.html (bedaŭrinde filmoj nur en pola kaj angla lingvoj)

Por Krakovanoj gravas ilia historio. Vi povas viziti multajn historiajn lokojn, muzeojn, monumentojn, tombejojn dediĉitaj al herooj ankaŭ de modernaj tempoj, kiuj batalis kontraŭ diversaj okupantoj kaj kontribuis al la loka societo. En la urbo oni povas sperti aktivan artistan vivon - funkcias tie multaj muzikaj kluboj, kongresejo ICE kie ofte okazas koncertoj, filharmonio, teatroj kaj opero, kabaretoj (kies celo estas amuzigi aŭskultantaron), kinejoj, galerioj de arto ktp. Sportoŝatantoj trovos en la urbo du stadionojn, grandan sportan halon kaj aliajn objektojn, kie oni povas sportumi. Krakovo estas ankaŭ grava centro de scienco kaj edukado, kie funkcias kelkdek universitatoj kaj aliaj altlernejoj.

Dum varmaj sunplenaj tagoj oni povas agrable moviĝi en Krakovo biciklante. Nuntempe eblas pruntepreni biciklojn en multaj lokoj kaj redoni en aliaj, ekzemple: <https://en.wavelo.pl/#map>

Multaj belaj fotoj pri la urbo rigardeblas ĉe la retejo: <http://www.krakow4u.pl>

Prilaboris : Adam Wilkus

Ĝisdatigite la 9an de oktobro 2017

Skribu al mi se vi volas renkontiĝi kaj ekscii plu: [adam\[punkto\]wilkus\[ĉe\]hotmail.com](mailto:adam[punkto]wilkus[ĉe]hotmail.com)